

La heroa vivo de Henri Dunant, 9-a parto
Claude Gacond, 104-a radioprelego, 1964.11.25 & 28

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la heroa vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la naŭan elsendon.

Henri Dunant ne estas la unua civilulo, kiu sin trudis en batalejon por provi mildigi la suferojn de la vunditoj. Oni konas aliajn kuraĝulojn, kiuj riskis sian vivon sen ordono por savi aliajn homojn, kies vundoj kaj forlasiteco estis nur la sekvo de ilia agado. Inter tiuj antaŭuloj de Henri Dunant mi nur mencios Pierre Bachelier de Gentes, tiu homo, kiu, dum la sieĝado de sia urbo, eliris la remparojn por sukuri la vunditojn, kiuj kuŝis forlasitaj. Tio jam okazis dum la deksepa jarcento. Kiel Henri Dunant, Pierre Bachelier de Gentes ne okupiĝis pri la deveno de la soldatoj.

Verŝajne Henri Dunant ne konis la kuraĝan sintenon de sia antaŭulo, ĉar la historiaj libroj ĝenerale forgesas raportoj pri la civila heroismo. Sed ni scias, ke li admiris la konduton de Florence Nightingale dum la krimea konflikto.

Kio novas ĉe Henri Dunant, tio estas lia kapablo trudi ordonojn al centoj da ĵus varbitaj helpemuloj, al armeestroj kaj eĉ al ŝtatestroj. Lia mistera aŭtoritato baziĝis sur nenia titolo, sed sur kapablo persvadi. Memoru lian junecon, kiam li varbis junulojn por la fondota **Universala Alianco de la Junularaj Kristanaj Unioj**.

La hazardo ofte bone antaŭpensas la okazaĵojn. Ĝi donis al tiu stranga negocisto, kiu provis kontakti la imperiestron Napoleono la tria por akiro de terhektaroj en Alĝerio, eksterordinaran preparon por povi plenumi gravegan homaman taskon. Ni nur memoru lian neordinaran religian edukadon, la nekutiman inklinon de liaj gepatroj, kiuj vartis pri la geoj de tuta ĝeneva kvartalo. Ni repensu al lia entuziasma aliĝo al la **Societo de la almozoj** kaj al lia pasio por ĉiuj sociaj agadoj.

Iuj pensas, ke la influo de individuoj sur la historian evoluon estas sensignifa. Ili opinias, ke kiam la homaro estas psikologie matura fari novan paŝon antaŭen, ĝi simple ekpaŝas. La vero estas, ke dum jardekoj, aŭ ni eĉ diru, dum jarcentoj, individuoj kuraĝis antaŭenpaŝi. Kaj subite, dank'al sia genio, unu el tiuj individuoj tiras la tutan homaron al si. Tiu homo ĉiam havas grandan influon sur la historion. Li ne nur donas nomon al viva fenomeno, li samtempe donas al ĝi naskiĝlokon, agaddirekton, penson. Ni, esperantistoj, bone komprenas tiun socian procezon. Ni scias, ke internacia lingvo estis ja historia bezono. Sed ni tre bone konscias, ke sen Zamenhof la internacia lingvo ne estus esperanto, ke ĝi ne estus naskiĝinta en la cara Ruslando, do ke la internacian lingvon ne tiom forte influus juda universalismemo kaj tiel diversaj lingvo-grupoj. Sen Zamenhof la esperanta flago certe ne flirtigus kvinpintan verdan stelon.

La ĝeneveco kaj kalvineco de Henri Dunant same klarigas la movadon **La Ruĝa Kruco**. Ĉu tiu Ruĝa Kruco jam ne estas la inversiĝo de la svisa flago? Kaj se tiu flago hodiaŭ personigas superreligian, superpolitikan kaj superrasan universalismon, tio estas dank'al la volo de Henri Dunant. Se ĝi personigas neŭtralecon, tio estas grandparte dank'al la svisa neŭtraleco. Se la **Ruĝa Kruco** tiel rapide progresis, tio estas ne nur dank'al la laborego de ĝia elpensinto, sed ankaŭ ĉar ĝi naskiĝis en Genevo, urbo, kiu tiam ludis grandegan spiritan kaj komercan rolon ĝis la ekstremo de la tero, kvankam politike ĝi nuliĝis al teritoria senpotenco.

Komparo inter Dunant kaj Zamenhof ne nur estas pedagogia artifiko. Ĝi ankaŭ ebligas reliefigi la similecon, kiu ekzistas inter iliaj du personecoj. Ambaŭ estas kreantoj, kiuj kapablis doni al sia kreaĵo ne nur korpan vivon, sed samtempe nevenkeblan spiritan forton. Tiu forto, kiu trovas sian fonton en la sama homaranismo, venkis ĉiujn barojn. Dum la ceteraj organizaĵoj aŭ ideoj sin klinis antaŭ la naciismoj, nek la Ruĝa Kruco, nek esperanto agnoskis la superecon de tiuj geografie limigitaj paganismoj. Ili ambaŭ flirtigis siajn flagojn ne nur apud la naciaj flagoj, sed plej eble super ili, simboligante tiel la nedisigeblan unuecon de la

La heroa vivo de Henri Dunant, 9-a parto
Claude Gacond, 104-a radioprelego, 1964.11.25 & 28

homaro. Neniu fera kurteno, neniu aliancanaro kapablis longe malhelpi la progresojn de tiuj du universalaj movadoj. Kaj apud la Ruĝa Kruco kaj esperanto mi ne konas aliajn movadojn, kiuj ne observis la dividon de la mondo inter la komunistaj kaj kapitalistaj naciaroj. Ilia destino estas ponta, ligila. Pro tio, kiam oni kulturas tutmondecon, ne nur indas, sed trege endas interesiĝi al ilia historio, kaj precipe al ilia naskiĝa periodo.

La spirita povo de Henri Dunant trovas sian sekreton en la malkovro farita sur la batalejo de Solferino : ke la kolektivoj devas obei al la moralaj leĝoj, kiel la individuoj. Kiam du individuoj sin buĉas unu la alian, oni ilin nomas krimuloj, oni ilin punas, ĉar ili endanĝerigas la socian vivon. Kiam du kolektivoj sin buĉas unu la alian, oni celebras tiun noblan agon kaj kantas tiun heroismon. Por Henri Dunant, tiu celebrado de krimo estas veneno, kiu riskas konduki la homaron al pereco. La bataliloj estas ĉiujare pli potencaj, do venos la tago, kiam la homoj, dum kolektivaj buĉadoj, sin ne nur reciproke mortigos, sed mortigos la tutan homaron. Tiu malkovro de granda vero donis al Henri Dunant profetan supervidon pri la disvolviĝo de la internaciaj okazaĵoj.

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-